Esperantologio / Esperanto Studies 14, Nova serio 6 (2025)
DOI: 10.59718/ees64137

GONG Xiaofeng
Universitato Nanchang, Ĉinio

Apliko de Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperantigita ĉina klasika romano *Ruĝdoma Sonĝo*

Resumo: *Hong Lou Meng* 'Ruĝdoma Sonĝo' estas unu el la kvar famaj klasikaj romanoj en Ĉinio. De ĝi aperis ĝis nun tradukaĵoj en 22 fremdlingvoj, inter ili ankaŭ troviĝas esperanta versio tradukita de s-ro Xie Yuming. La romano estas bona esplorcela materialo por tradukarto. Pro diferencoj en kulturo kaj kognaj temoj, malkongruoj inter la originala teksto kaj la tradukita teksto estas neeviteblaj dum la integra procezo de tradukado. Laŭ hipotezo de Mona Baker (1992), tradukitaj tekstoj ankaŭ havas apartan "tradukan stilon", kiun oni povas karakterizi per kvar Universalaj Trajtoj de Tradukado, nome: simpligo, eksplicitigo, normigo kaj interfero. Surbaze de tiu teorio, ĉi tiu studo prezentas analizon pri la plej ofte cititaj Universalaj Trajtoj en la esperanta versio de *Ruĝdoma Sonĝo,* kompare kun du konataj tradukoj en la angla lingvo (Cao Xueqin, trad. Hawkes kaj Minford 1973; Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978). La rezultoj montras, ke la hipotezo de Universalaj Trajtoj de Tradukado estas valida aŭ parte valida en la tri tradukaĵoj.

Ŝlosilvortoj: Universalaj Trajtoj de Tradukado; simpligo; eksplicitigo; normigo; interfero; *Ruĝdoma Sonĝo*

1 Enkonduko

Ruĝdoma Sonĝo (*Hong Lou Meng*, 红楼梦), ankaŭ nomata *la Rakonto de la ŝtono* (石头记), verkita de Cao Xueqin meze de la 18-a jarcento, estas unu el la majstroverkoj de ĉina literaturo, nome unu el la Kvar Grandaj Klasikaj Romanoj de Ĉinio[1]. Ĝi estas ĝenerale konsiderata kiel la pinto de ĉina fikcio kaj honorita kiel "Enciklopedio de la feŭda socio de Ĉinio". La romano ne nur heredas la tradician popularan lingvon, sed ankaŭ uzas parolan lingvon, popoldirojn, idiomojn, proverbojn, dialektojn kaj klasikan literaturan lingvon, kiuj estas malfacile tradukeblaj en fremdlingvojn. Samtempe la romano estas bona esplorcela materialo por tradukarto. Tial

1 La aliaj tri estas: Ĉe akvorando, Romano pri tri regnoj kaj Pilgrimado al la Okcidento, esperantigitaj de Laŭlum (Li Shijun) (Kvar famaj klasikaj romanoj 2022).

multaj tradukistoj dediĉis sin al tradukado kaj studado de ĝi ekde ties eldono en la 18-a jarcento.

Ĝis nun aperis tradukaĵoj en 22 fremdlingvoj kaj 8 etnaj naciminoritataj lingvoj, inter ili ankaŭ troviĝas esperanta versio de Xie Yuming eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino en la jaroj 1995–1997. La romano *Ruĝdoma Sonĝo* en esperanta traduko havas 1893 paĝojn en tri volumoj, konsistanta el 120 ĉapitroj (Cao Xueqin/Xie Yuming 1995–1997). Pro la majstra traduko, Xie estas premiita per OSIEK-premio (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj, OSIEK) en 1999.

Korpuso (aŭ tekstaro) estas aro da tekstoj aŭ transskribitaj konversacioj/paroloj, kiun oni uzas kiel tuton por studo. Kun la evoluo de elektronika informa teknologio, korpusa esplorado, kiu aperis nur en la 1990-aj jaroj, rapide disvolviĝis en la lastaj jaroj kaj fariĝis pli kaj pli grava metodo por tradukarto. Helpe de la korpuso, fakuloj serĉis kaj provis malkovri regulecojn en vastaj produktoj, kiuj kunhavas komunajn procezojn kaj metodojn en tradukprocezado. La vasta uzo de korpusoj en tradukesplorado ne nur ebligis la evoluon de novaj teorioj, kiel la Universalaj Trajtoj de Tradukado, sed ankaŭ montris, ke eĉ unuopa traduko povas funkcii kiel 'korpuseto' por analizi tiujn fenomenojn.

El ĉiuj studoj pri Universalaj Trajtoj de Tradukado, la hipotezoj de Mona Baker estas la plej famaj. Laŭ Baker, Universalaĵoj estas lingvaj trajtoj kiuj tipe okazas en tradukitaj prefere ol originalaj tekstoj kaj supozeble estas sendependaj de la influo de la specifaj lingvoparoj implicitaj en la procezo de tradukado (Baker 1993, 243). Post pli ol jardekaj studoj, la hipotezoj pri la Universalaj Trajtoj de Tradukado de Baker estas konkluditaj kiel simpligo, eksplicitigo, normigo kaj leĝo de interfero.

Spertuloj kombinis korpusojn por entrepreni multajn studojn por kontroli la hipotezojn. Granda nombro da korpus-bazitaj tradukstudoj konfirmis la tradukajn universalaĵojn proponitaj de Baker (Laviosa 2002, 60–62; Bernardini 2004; Becher 2010; Xiao 2010, 8; LI Bingru 2022). Kaj la postaj esploroj ĉefe koncentriĝis sur tri aspektoj, t.e. simpligo (Laviosa 1998; Olohan kaj Baker 2000), eksplicitigo (Øverås 1998; Pym 2005) kaj normigo (Toury 1995; Kenny 2001; Mauranen 2007), kaj kun malpli da esplorado pri interfero (Laviosa 1998). Ankaŭ ne mankas esploroj pri Universalaj Trajtoj de Traduko en la anglaj versioj de *Ruĝdoma Sonĝo* (ZHU Chaowei 2016). Sed ĝis nun oni ankoraŭ ne faris esploradon kaj komparadon inter la ĉina, esperanta kaj la anglaj versioj de *Ruĝdoma Sonĝo*.

Ĉi tiu artikolo celas fari sisteman kaj teorian studon de la Universalaj Trajtoj de Tradukado aplikitaj en la esperanta versio, observi kiel la trajtoj estas reflektitaj en la tradukaĵoj, kaj enketi kiajn efikojn ili havas sur la kvaliton de la tradukaĵoj, komparante kun la du anglaj versioj.

2 Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperanta versio

Estas grandaj diferencoj inter la fona kulturo kaj lingvostrukturo de la cellingvo kaj la fontlingvo. Kun la progreso de la korpusa esplorado, homoj malkovris per kompara esplorado, ke ekzistas kelkaj Universalaj Trajtoj de Tradukado, kaj la malkovro de tiuj komunaj trajtoj plibonigis la kvaliton de la traduko.

Universalaj Trajtoj de Tradukado havas grandan signifon en tio, ke ni povas esplori la naturon de traduko, kompreni la interagadon dum lingvaj interŝanĝoj, kaj studi la kreopovon de la cellingvo, esprimante lingvajn kaj kulturajn mankojn.

2.1 Simpligo

Simpligo, kiel difinas Baker, estas "the tendency to simplify the language used in translation" 'la tendenco simpligi la lingvon uzatan en tradukado' (Baker 1996, 181–182). Tio signifas, ke traduk-teksto supozeble estas pli simpla ol la fonto-teksto en vortfarado, sintakso kaj/aŭ stilo. Tri specoj de simpligo estis identigitaj en tradukita teksto: leksika, sintaksa kaj stila (ekzemplojn oni prezentos sube).

La simpliga tendenco de tradukitaj tekstoj manifestiĝas ĉefe en la anstataŭigo de hiponimoj per hiperonimoj (Baker 1996, 176), kaj anstataŭigo de maloftaj vortoj en la fontlingvo per oftaj vortoj. Tial simpleco reflektiĝas en la longeco de frazoj, elekto de vortprovizo ktp.

Oni povas vidi en la sekvaj ekzemploj, ke la trudukinto ankaŭ uzis sintaksajn rimedojn por simpligi la fraztradukojn.

2.1.1 Anstataŭigo de frazoj per substantivaj vortgrupoj

Ĉine	*如今**太爷**也没了,**只有老奶奶带着一个亲生的姑娘过活,也并没有哥儿兄弟**,可惜他竟一门尽绝了.* Rújīn tàiyé yě méiliǎo, zhǐyǒu lǎonǎinai dàizhe yīgè qīnshēng de gūniáng guòhuó, yě bìng méiyǒu gē er xiōngdì, kěxí tā jìng yī mén jǐn juéle.
Interlinia traduko	Nun la sinjoro jam mortis, Nur la maljunulino vivas kun sia biologia filino, kiu ne havas fratojn, Kia domaĝe, ke lia familio estingiĝas.
Esperante	***La maljuna Xia*** *jam mortis.* ***Nur senfila vidvino kun filino****. Tia familio venas al fino!* (Ĉapitro 79) (Xie Yuming)

Ĉi tie, la originala signifo de la frazo substrekita estas ‘Nur la maljunulino vivas kun sia biologia filino, kiu ne havas fratojn’, tre longa frazo, la tradukinto uzis tre simpligitan rimedon: *Nur senfila vidvino kun filino*. Koncize kaj fidele.

Krome, la tradukinto ankaŭ uzas eksplicitan metodon (klarigitan sube), ĉar li aldonis la familian nomon *Xia* por ekspliciti kiu mortis.

2.1.2 Sensubjektaj aŭ nekompletaj frazkomponentoj

Ankoraŭ troviĝas en la tradukita teksto multaj esprimoj kun neniuj subjektoj aŭ nekompletaj frazkomponentoj, kiel “Ja malfacile administri tiel grandan domon”:

Ĉine	*刘姥姥因说：“这凤姑娘今年大还不过二十岁罢了，就这等有本事，**当这样的家，可是难得的**。”* Liú lǎolao yīn shuō:“Zhè fèng gūniáng jīnnián dà hái bùguò èrshí suì bàle, jiù zhè děng yǒu běnshì, dāng zhèyàng de jiā, kěshì nándé de.
Interlinia traduko	Anjo Liu diris,“Ĉi tiu knabino Feniksa ĉi-jare havas nur dudek jarojn, sed jam tiel kapabla, mastrumi tian domon estas malofte.”
Esperante	*“Feniksa, malpli ol dudekjara, estas jam tiel kapabla,” rimarkis Anjo Liu. “**Ja malfacile administri tiel grandan domon.**”* (Ĉapitro 6) (Xie Yuming)

La tradukita romano abundas je tiaj ekzemploj, kiaj “La leteron ĝuste al li” (Ĉapitro 3), “Kial plage li?” (Ĉapitro 52), “La kapo dolora, nazo obstrukcita kaj voĉo raŭka.” (Ĉapitro 52) (Xie Yuming).

2.1.3 Koncizaj dialogoj

La tradukinto uzas tre koncizajn dialogojn. En ĉapitro 2, *Jia Yucun* eliras kaj direktas sin al vilaĝa drinkejo por eksciti la sensojn; tie renkontas metropolan antikvaĵiston *Leng Zixing*, jen la dialogoj inter ili:

> **“Kiam ĉi tien, frato?”** ridete demandis Jia Yucun. **“Ekster mia atendo! Vere, hazardo vin revidi.”** (Ĉapitro 2)

En la substrekitaj partoj mankas subjektoj, tamen kun klaraj signifoj. Tiaj frazoj spicas la tutan scenon kaj psikajn agojn de la rolanto.

2.1.4 Esprimi rime

Ĉine	子兴道："依你说，**'成则王侯败则贼了'**。 "Zi xìng dào:"Yī nǐ shuō,'chéng zé wánghóu bài zé zéile'."
Interlinia traduko	Zixing diris: "Laŭ viaj vortoj, se li sukcesus, li fariĝu la reĝo, se li malsukcesus, li estus ŝtelisto."
Esperante	"*Laŭ vi '**Venkinto — reĝo, venkito — feĉo**', ĉu ne?*" (Ĉapitro 2)

En tiu ĉi frazo la idiomaĵo "成则王侯败则贼" (Chéng zé wánghóu bài zé zéi), rilatas al du partioj konkurantaj por superregado: Tiu, kiu sukcesas, estas nomata imperiestro, kaj tiu, kiu malsukcesas, bandito. "Imperiestro" kaj "bandito" estas juĝitaj nur surbaze de sukceso aŭ malsukceso. Ankaŭ konata kiel "La venkanto estas la reĝo, la perdanto, la ŝtelisto". En la romano *Ruĝdoma Sonĝo*, la tradukinto nur uzas kvar vortojn por esprimi ĝin, *"Venkinto – reĝo, venkito – feĉo"*, tre koncize, perfekte, eĉ kun (preskaŭ-) rimo. Krome, la tradukinto aldonas "ĉu ne?", kiu tuj transdonis la tonon de la origina frazo. Pliaj rimaj esprimoj troviĝas en la romano:

'Domo nobela — maro malhela'. (Ĉapitro 6)

Por kio veni, se neniom preni? (Ĉapitro 6)

buŝa promeso, tuja forgeso. (Ĉapitro 12)

Ĉe falo de la arbo, simioj je malvarbo. (Ĉapitro 12)

Alia loko, alia moro' (Ĉapitro 41)

Lok' favora — hom' valora. (Ĉapitro 48)

Lavange la malsano venas, kurac' ĝin lante malbobenas. (Ĉapitro 52)

Eĉ objekto forte sonas, se maljuston al ĝi donas. (Ĉapitro 58)

...

2.2 Eksplicitigo

Baker difinis, ke "Explicitation is the tendency in translation to 'spell things out rather than leave them implicit'" 'Ekspliko estas la tendenco en traduko "literumi aferojn prefere ol lasi ilin implicitaj"' (Baker 1996, 180). En sia korpuso de romanoj tradukitaj de la nederlanda en la anglan, Vanderauwera (1985) montris multnombrajn okazojn, kie la tradukintoj aplikas eksplicitajn teknikojn, ekzemple, la uzoj de interjekcioj por esprimi pli klare la progresadon de la pensoj de la roluloj aŭ por akcenti difinitan interpreton, plivastigon de densigitaj fragmentoj, aldonon de modifiloj, kvalifikiĝoj kaj konjunkcioj por atingi pli grandan travideblecon, aldonon de kromaj informoj, enmeton de klarigoj, ripeton de antaŭmenciitaj detaloj por klareco, precizajn interpretojn de implicaj aŭ neklaraj datumoj, disponigon de pli precizaj priskriboj, eksplicitan nomadon de geografiaj lokoj kaj la malambiguigon de pronomoj kun precizaj formoj de identigo. Baker (1992) ankaŭ raportis plurajn ekzemplojn, en kiuj la tradukistoj enmetis pliajn fon-informojn en la celtekston por transponti kulturajn diferencojn. Tio estas ebla kaŭzo de pli longa traduka teksto. Rilate koherecon oni atendus ankaŭ pli da nominalaj frazoj ol personaj pronomoj en tradukoj (YANG Chongchong 2013).

Eksplicitigo ofte estas menciata kune kun la aliaj trajtoj de tradukitaj tekstoj, ekz. kune kun implicigo, kune kun aldono- kaj preterlaso-strategioj.

2.2.1 Aldono de kunligantaj vortoj

La evidenta trajto de la eksplicita fenomeno estas plimultigo de la funkci-ovortoj. Eksplicitigo estas facile rimarkebla precipe en ĉina-esperantaj tradukoj de la markiloj de kohereco. Esperanto havas elstaran hipotakson kaj riĉajn markitajn subjunkciojn. Sed la ĉina havas fortan paratakson kaj malofte uzas koherajn markilojn. En la procezo de ĉina-esperanta tradukado, influita de la eksplicita strategio, la logika rilato inter la subfrazoj estas ĝenerale esprimita eksplicite aldonante koher-signojn.

Jen kelkaj ekzemploj en Ĉapitro 4, por bone kompari, la anglaj tradukoj ankaŭ estas cititaj el la plej fama angla versio (Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978).

Ĉine	我家小主人原说，第三日方是好日，再接入门。 Wǒjiā xiǎo zhǔrén yuán shuō, dì sān rì fāng shì hǎo rì, zài jiē rùmén.
Angle (Yang kaj Yang)	Our master said he'd take her home three days later **because** that would be a lucky day.
Esperante (Xie Yuming)	***Tamen*** *mia mastro diris, ke li prenos la knabinon en la tria tago,* ***ĉar*** *ĝi estas bonaŭgura.*

Ĉine	老爷明日坐堂，只管虚张声势，动文书，发签拿人。 Lǎoyé míngrì zuòtáng, zhǐguǎn xūzhāngshēngshì, dòng wénshū, fā qiān ná rén.
Angle (Yang kaj Yang)	**When** Your Honour tries the case tomorrow, make a great show of sending out writs **and** issuing warrants.
Esperante (Xie Yuming)	*Morgaŭ Via Moŝto faru la grandan scenon disdoni skriban ordonon* ***kaj*** *sendi homojn por kapti la krimulon.*

Ĉine	咱们且忙忙的收拾房子，岂不使人见怪*?* Zánmen qiě máng mang de shōushí fángzǐ, qǐ bù shǐ rén jiànguài?
Angle (Yang kaj Yang)	It will appear very strange to them **if** we're in such a rush to open up one of our houses.
Esperante (Xie Yuming)	***Ĉu*** *oni ne sentus strangecon pri nia hasta aranĝo de la propraj domoj?*

Ĉine	请姨太太就在这里住下，大家亲密些。 Qǐng yítàitài jiù zài zhèlǐ zhù xià, dàjiā qīnmì xiē.
Angle (Yang kaj Yang)	Do invite your sister to stay here, **so that** we can all be close together.
Esperante (Xie Yuming)	*Via fratino restu ĉi tie,* ***tiel do*** *pli intime!*

Ĉine	小人告了一年的状，竟无人作主。 Xiǎo rén gàole yī nián de zhuàng, jìng wú rén zuò zhǔ.
Angle (Yang kaj Yang)	I lodged a charge a year ago, **but** nothing came of it.
Esperante (Xie Yuming)	*De unu jaro mi akuzas,* ***sed*** *vane!*

En tiuj ĉi ekzemploj, la logikaj rilatoj estas implicite esprimitaj en la origina verko. Tamen, kiam ili estas tradukitaj en la cellingvon, interligaj signoj estas aldonitaj por legebleco. Ĉi tio ŝajnas esti plia pruvo pri inter-lingva eksplicitigo en traduko, kiel Huang Libo indikis, "ekzistas du specoj de eksplicitеco, inter-lingva eksplicitеco kaj komparebla eksplicitеco" (HUANG Libo 2007, 13).

Per korpusoj, oni trovis, ke ĉi tiuj eksplicitaj trajtoj estas plejparte reflektitaj en konjunkcioj kiuj esprimas logikajn rilatojn.

2.2.2 Aldono de specifa informo

La strategio de "eksplicitigo" rilatas aldonon de kelkaj vortoj aŭ piednotoj por pliigi informojn (inkluzive de politikaj, ideologiaj, kulturaj, ktp.) dum la tradukprocezo, por ke la legantoj povu pli bone kompreni la signifon de la originala teksto. La diferencoj inter ĉinaj kaj okcidentaj kulturoj postulas, ke la tradukisto faru profundan analizon de la kultura fono kaj lingvostilo de la fontlingvo dum la interpretado de la originalteksto; la kultura fono kaj lingvostilo de la cellingvo same kiel la mensa spaco de la leganto devas esti pripensita dum la integriĝoprocezo. Tial aldoni kelkajn necesajn klarigajn informojn al la traduko povas igi la tradukon pli kompleta.

Ekzemple, en la suba fontteksto nur aperas nomo *Miaoyu,* sed en la esperanta traduko aldoniĝis kroma informo "ĝia mastrino":

Ĉine	当下贾母等吃过茶，又带了刘姥姥至栊翠庵来. **妙玉**忙接了进去. Dāngxià jiǎ mǔ děng chīguò chá, yòu dàile liú lǎolao zhì lóng cuì ān lái. Miào yù máng jiēle jìnqù.
Esperante (Xie Yuming)	*Post teo Avino gvidis la vilaĝaninon al la Verdlatisa Bonzinejo.* ***Ĝia mastrino Miaoyu*** *prompte bonvenigis Avinon en la korton kie arboj kaj floroj prosperis.* (Ĉapitro 41)

Fakte, "en la korton kie arboj kaj floroj prosperis" ankaŭ estas aldonita informo.

Alia ekzemplo en ĉapitro 9, la intrigo okazas en la klasĉambro, sed en tiu ĉi originala teksto tio ne estas menciita; por bone komprenigi legantojn, la tradukinto aldonis informon pri la loko "plonĝis ... en la klasĉambron":

Esperante (Xie Yuming)	*Mingyan estis la plej fidela al Jado, kvankam juna kaj sensperta. Aŭdinte tion li, kiu eĉ sen ia kaŭzo ofte turmentadis aliajn,* ***plonĝis*** *kun la instigo de Jia Qiang* ***en la klasĉambron*** *kaj, anstataŭ voki "Sinjorido Jin!", kriis "Ulo Jin, kio vi estas!"* (Ĉapitro 9)

Similaj kazoj troviĝas multe en la tradukaĵo.

2.2.3 Eksplicado de pronomoj per substantivoj

Substantivoj ofte estas eksplicitataj, kiel montras la sekva ekzemplo en *Ruĝdoma Sonĝo*: En ĉapitro 3, Jaspa rakontas al sia avino, ke ŝi prenas medikamentojn ĉiutage kaj multaj famaj kuracistoj penis, sed vane. Foje fava bikŝuo volis forporti ŝin, tiam nur trijaran, sed ŝiaj gepatroj rifuzis. Siatempe, la bikŝuo diris:

Ĉine	***他***又说：既舍不得***他***，只怕***他***的病一生也不能好的了. **Tā** yòu shuō: Jì shěbudé **tā**, zhǐ pà **tā** de bìng yīshēng yě bùnéng hǎo dele.
Interlinia tradu-ko	Li ree diris, jam domaĝi lin, tre probable lia malsa-no dumvive ne resaniĝos.
Esperante (Xie Yuming)	***Tiu*** *do diris, "**Vi** domaĝas? **Ŝi** neniam resaniĝos."*

En la fontoteksto troviĝas tri *ta*-oj, la unua *ta* indikas la bikŝuon, sed la aliaj du *ta*-oj rilatas al Jaspa. Multaj popolaj romanoj en la dinastio Qing, kiel *Ruĝdoma Sonĝo*, simple uzis la vorton *ta* 'li', ĉar *ta* en la ĉina tiam ankoraŭ ne diferencis inter viro kaj virino. La fokuso sur la triapersonaj pronomoj li, ŝi, kaj ĝi en la moderna ĉina originis de la tradukpraktiko en la kultura fono de la disvastiĝo de okcidenta lernado al la Oriento en la Dinastio Qing.

El la esperanta teksto por senambiguigi, la tradukinto distingas tiujn *ta*-ojn, la unua *ta* estas tradukita kiel *tiu*, kaj la dua ellasita, la tria *ŝi*. Ne nur tio, sed ankaŭ aldoniĝis pronomo *Vi*.

2.2.4 Klarigoj ĉe la idiomaĵoj

Idiomaĵoj kaj proverboj estas koncizaj kaj vivecaj, kaj havas pli fortan esprimpovon ol ordinaraj vortoj. La plej multaj el ili venas de historiaj kaj literaturaj aludoj kaj havas profundajn kulturajn konotaciojn. En *Ruĝdoma Sonĝo* troviĝas sennombraj idiomaĵoj, kvar-silabaj vortoj, la tradukinto foje simpligas ilin por ke alilandaj legantoj povu kompreni ilin, samtempe evitante klarigojn de historiaj aludoj, sed plejparte ili estas detale eksplicitaj per klarigaj piednotoj.

Jen la ekzemplo:

Ĉine	*彩霞咬着嘴唇，向贾环头上戳了一指头，说道："没良心的！**狗咬吕洞宾，不识好人心**。"* Cǎixiá yǎozhe zuǐchún, xiàng jiǎ huán tóu shàng chuōle yī zhǐtou, shuōdao: "Méi liángxīn de! Gǒu yǎo lǚdòngbīn, bù shí hǎo rénxīn."
Esperante (Xie Yuming)	*Ŝi mordis la lipon kaj fingre pikis lian kapon. "Sendankulo! 'Bojado al Lü Dongbin sonas – la bonkorulon hund' ne konas'!"* (Ĉapitro 25) * **kun piednoto**: *Lü Dongbin: (798 – ?) Laŭlegende li, ĉar tre bonkora, fariĝis feo. Fakte li estis eruda taoisto.*

Ĉi tio estas duparta alegoria diraĵo transdonita ĝis hodiaŭ. *Lü Dongbin* estas unu el la ok eternuloj en la ĉina mitologio. Oni kutime uzas la diraĵon por riproĉi homojn sendankemajn ne sciantajn kio estas bona kaj kio malbona por si mem. Ĉinaj legantoj konas la aludon "La hundo mordis *Lü Dongbin*", sed estas malfacile por la cellingvaj legantoj kompreni ĝin. Tial la tradukinto unue laŭvorte tradukas ĝin, kaj poste aldonas komentadon kaj klarigan piednoton al la figuro "Lü Dongbin". Tio permesas al cellingvaj legantoj kompreni la profundan kulturan ligon inter "hundo" kaj "*Lü Dongbin*".

2.3 Normigo

Normigo estas difinita de Baker tiel: "The tendency in translation to conform to patterns and practices that are typical of the target language, even to the point of exaggeration" 'la tendenco konformiĝi al ŝablonoj kaj praktikoj, kiuj estas tipaj de la cellingvo, eĉ ĝis troigi ilin.' (Baker 1996, 183). Baker rimarkis, ke normigo estas reflektita en gramatiko, tipa interpunkcio kaj kunuzataj ŝablonoj. Vanderauwera trovis ampleksajn signojn de ŝanĝoj en interpunkcio, vortelekto, stilo, frazstrukturo, kaj tekstorganizo, ĉion el kiuj ŝi konsideris kiel manifestiĝojn de ĝeneralaj tendencoj en tekstaj konvencioj, ŝajne aprobita de la celgrupo (Vanderauwera 1985, 93).

Normiga fenomeno ankaŭ troviĝas en la traduko de *Ruĝdoma Sonĝo*, ĉefe montriĝas en formulaj frazoj, nomoj de rolantoj kaj poezia strukturo.

2.3.1 Formulaj frazoj

Ruĝdoma Sonĝo estas tipo de tradicia ĉina romano kun ĉiu ĉapitro havanta ĉe la kapo versoduon, kiu donas la esencon de sia enhavo. En tiuspecaj romanoj la ekzisto de formulaj frazoj estas absolute necesa. Komenca frazo ofte uzatas en tradiciaj rakontoj aŭ romanoj kiel "La rakonto diras, ke..."; "Estas rakontate, ke...". Je la fino de ĉiu ĉapitro, la originala aŭtoro uzos la

formulon "Se vi volas scii kio okazis, bonvolu legi la sekvan ĉapitron" por prezenti la rakonton al la sekva ĉapitro.

En *Ruĝdoma Sonĝo*, estas entute 120 ĉapitroj; preskaŭ je komenco kaj fino de ĉiu ĉapitro legiĝas supraj formuloj, sed la tradukinto ne esperantigis ilin en ĉiu ĉapitro. Mi ĉitis kelkajn por prezenti:

En la komenco de la ĉapitro:

> Kiel menciite, Jaspa kaj ŝiaj kuzinoj vidis, ke Matrono Wang diskutas pri familiaj aferoj, pro kio ili iris al la apartamento de Teksa. (Ĉapitro 4)
>
> Kiel dirite, Keqing tre miris, ke Jado kriis sonĝe ŝian infannomon; tamen ŝi sin ĝenis por fari demandon al li. (Ĉapitro 5)
>
> Informite, ke Feniksa respondecas pri la internaj aferoj, Lai Er, ĉefekonomo de la Domo de Ningguo, kolektis siajn subulojn. (Ĉapitro 14)
>
> Jado, kiel ni scias, rakontis pri rataj spiritoj en la ĉambro de Jaspa. (Ĉapitro 20)
>
> Kiel rakontite, Jaspa atribuis al Jado tion, ke Qingwen ne ovris al ŝi la pordon. (Ĉapitro 28)
>
> Kiel rakontite, Anjo Liu kriis kun larĝa gesto, "Floroj falas, tiom tiom grandan kukurbon naskas!" (Ĉapitro 41)
>
> Kiel supre dirite, Jia Zhen kaj Jia Lian tuj ordonis al siaj servoknaboj disŝuti monerojn sur la scenejon. La monera tintado forte plezurigis Avinon. (Ĉapitro 54)
>
> Kiel dirite, Pacema prenis la manĝon kune kun Feniksa kaj servis al ŝi en la manlavo kaj gargaro. (Ĉapitro 56)
>
> Kiel supre dirite, ... (Ĉapitro 58)
>
> Kiel dirite, Jia Lian vizitis Matronon Wang por raporti al ŝi la okazaĵon. (Ĉapitro 103)

Fine de la ĉapitro:

> Kio okazis poste al la dando? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 11)
>
> Kio sekvis? Bonvole legu plu! (Ĉapitro 12)
>
> Jen la kvin punktoj, de ŝi resumitaj. Kiel ŝi traktis ilin? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 13)
>
> Sed kian impreson li havis en proksimo? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 14)
>
> Ĝis la sekva ĉapitro! (Ĉapitro 15)

Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 18)

Kio sekvis? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 20)

Pri kio? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 21)

Por scii, kio okazis plu, bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 28, 53, 54, 56, 57, 58, 59, 60.....)

2.3.2 Normigita traduko de personaj nomoj kaj loknomoj

La ĉefaj roluloj en la *Ruĝdoma Sonĝo* havas esperantigitajn nomojn, ekz.: Jado, Jaspa, Ora, Feniksa, Teksa, Penetra (ĉambristino de Jado), Koincida, Lotusa, Pacema, ktp. Plej multaj nomoj de homoj uzas pinjinon, ekz. Jia Yucun, la ceteraj 7 el 12 ĉarmulinoj de Jinling estas Yuanchun, Tanchun, Xiangyun, Miaoyu, Yingchun, Xichun, Qin Keqing. Por tiuj, kiuj ne havas konkretajn nomojn, la tradukinto uzas esperantajn alparolojn, ekzemple: Avino, Matrono Wang, Matrono Xing, Dua Fratino You, Tria Fratino You, Anjo Liu, Bofranjo Zhou, Onklino Xue, ktp.

En la romano, troviĝas multe da homofonoj, la tradukinto uzas piednotojn por klarigi ilin, ekz. Zhen Shiyin: Homofono de "veraj aferoj estas kaŝitaj" (*zhen* 'vera', *shi* 'afero' kaj *yin* 'kaŝi'). Por historiaj nomoj, la tradukinto uzas pinjinon kaj aldonas piednotojn, kiel Pan An, Zijian, Xizi, Wenjun.

Cao Xueqin mencias multajn verajn loknomojn en la libro, sed plejparte Cao Xueqin uzas la nomojn de malsamaj dinastioj, eĉ kelkaj veraj el ili estas ruze anstataŭigitaj per malveraj, kiuj estas tiel preskaŭ perfektaj, ke oni prenas ilin por la veraj. Entute troviĝas preskaŭ cent loknomoj en la libro. Plejmulto de la loknomoj estas fikciaj, sed konsiderinda nombro el ili estas realaj urboj, stratoj kaj pitoreskaj lokoj. La urboj kiuj estas plej menciitaj estas Jinling, Gusu kaj Weiyang, aŭ la nunaj Nankino, Suzhou kaj Yangzhou. Xie Yuming uzas pinjinon en ĉiuj tradukoj de realaj loknomoj, kiel la prefektujo Jiangning, la prefektejo Yingtian, la gubernio Chang'an, Lin'an, Suzhou, Jinling, Weiyang (Yangzhou), la Palaco Daming, ktp. Male, ses lokoj en *Ruĝdoma Sonĝo* estas tradukitaj tute laŭ esperantaj nomoj: la Majesta Ĝardeno, Bambua Loĝio, Delicruĝa Korto, Galanga Parko, Tollava Montvilao kaj la Verdlatisa Bonzinejo.

La ĉefurbo en *Ruĝdoma Sonĝo* estas "Chang'an", kaj la origino de la kvar famaj familioj estas en urbo "Jinling" (Nankino). En la esperanta versio, la tradukinto nur mencias ĝin kiel "nia ĉefurbo" (ĉapitro 6), "la urbo' (ĉapitro 79), eĉ ellasis la tradukon aliloke en ĉapitro 79.

En la romano, dufoje aperas lokonomo "大明宫" (Dàmíng gōng), unu el la reĝaj palacoj dum la Tang-dinastio. En la esperanta versio estas malsamaj esprimoj kiel "la Palaco Daming" (Ĉapitro 13) kaj "la Grandluma Palaco" (ĉapitro 18).

Koncerne la budhanan vorton: 阿弥陀佛 (ē mí tuó fó) Amitabo (Amitaba Budho), en la esperanta versio la tradukinto uzas unuigitan esprimon de komenco ĝis fino: Amitabo. La angla traduko de Yang kaj Yang estas konsekvenca: en la tuta libro aperas du esprimoj: "Amida Buddha!", "Buddha be praised!" (Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978). Tamen Hawkes & Minford uzas malsamajn esprimojn por tiu ĉi budha vorto, krom la supremenciitaj anglaj esprimoj (Cao Xueqin, trad. Hawkes kaj Minford 1973).

2.3.3 Normigo en poezia strukturo

Estas diferencoj inter la esperanta kaj la ĉina poezio en multaj aspektoj. El fonologia vidpunkto, ĉina rimiĝo signifas, ke la vokalmezo kaj vokalfinaĵo estas samaj. En Esperanto-poezio la rimvortoj, kiuj finas versojn, estas samaj. El metrika vidpunkto, la ĉina estas tona lingvo, kaj la altiĝoj de la ritmo estas reflektitaj per "ebenaj kaj oblikvaj" tonoj, dum Esperanto-poezio uzas piedon kiel la unuon, kaj la tonoj estas reflektitaj per "senakcentaj kaj akcentaj" silaboj. Tial, tradukante ĉinan poezion en Esperanton, oni devas integri la poeziajn esprimkutimojn de la celteksto kaj la fontoteksto, kaj uzi tradukmetodon konforman al la lingvaj trajtoj kaj esprimkutimoj de Esperanto por igi la tradukon legebla kaj inverse.

Ĉine	满纸荒唐言，一把辛酸泪！ mǎn zhǐ huāngtáng yán, yī bǎ xīnsuān lèi! 都云作者痴，谁解其中味？ Dōu yún zuòzhě chī, shéi jiě qízhōng wèi?
Interlinia traduko	Plena papero de absurdaĵoj, Plenmano da maldolĉaj larmoj! Ĉiuj diras, ke la aŭtoro estas freneza, Kiu komprenas la guston en ĝi?
Esperante (Xie Yuming)	*De fantastaj kaj larmsaturitaj* *historioj la folioj plenas!* *Ĉiuj diras, ke l' aŭtor' manias.* *Sed kiu la guston jam komprenas?* (Ĉapitro 1)

Tiu ĉi kvinsilaba verskvaro en formo de la antikva *Jue*-stilo (kvin-silaba kvarono) aperas en la unua ĉapitro. Ĝi estas la sola poemo verkita de la aŭtoro en sia propra titolo. Laŭvorta signifo de la unua verso "满纸荒唐言 (mǎn zhǐ huāngtáng yán)" estas 'La papero estas plena de sensencaĵoj', jen la sinmoko de la aŭtoro por sia verko. La aŭtoro maltrankviliĝas, ke lia peniga verko ne estos komprenata de estontaj generacioj, kaj antaŭvidas, ke

oni ridos pro lia nescio kaj naiveco. Kvankam la lingvo de ĉi tiu poemo estas simpla kaj facile komprenebla, la animstato estas sufiĉe profunda.

Komparante la esperantan tekston kun la originala teksto, la tradukita teksto neŭtraligas la kulturajn trajtojn de la fontlingvo kaj la cellingvo, kaj en formo kaj en signifo. El formala vidpunkto, la originala teksto havas la finan rimon[2] *èi*, kaj la traduko sekvas rimon xaxa (x = senrima), la dua kaj la kvara versoj rimas je *-enas*, ne nur konservas la rimformon, sed ankaŭ konformas al la esprimkutimoj de la esperanta poezio. Tio faciligas ĝin al okcidentaj legantoj akcepti. Krome, ĉiu linio de la traduko havas dek silabojn kaj adoptas la ritman formon de trokeo por atingi la saman kadencon kiel la originala teksto. Ambaŭ versioj montras la profundajn sentojn de la aŭtoro, kvankam per malsamaj metrikaj rimedoj.

2.4 Interfero

Krom la supre menciitaj Universalaj Trajtoj, interfero estas konsiderata kiel ofta kaj tipa. Toury trovis, ke tradukistoj emas esti influitaj de la fontaj eldiroj, rezultigante, ke la esprimoj de la cellingvo ne estas sufiĉe glataj aŭ naturaj (Toury 1995). Kiom ajn profesia estas la tradukisto en sia tradukpraktiko, interfero ĉiam povas trovi sian vojon kaj iagrade funkcii dum la tradukprocezo. Tradukistoj tendencas produkti tradukitan eldiron ne retrovante la cellingvon per sia propra lingva scio, sed rekte de la fonteldiraĵo mem. Laŭ Baker, la difino de interfero estas: "phenomena pertaining to the make-up of the source text tend to be transferred to the target text" 'fenomenoj apartenantaj al la konsisto de la fontoteksto emas esti transdonitaj al la celteksto' (Laviosa 2009, 307).

Pro la leĝo de interfero en tradukprocezo, la trajtoj de la originalaj tekstoj povas malhelpi la tradukistojn, kaj lasi la tradukitajn tekstojn kun ambaŭ trajtoj de cellingvo kaj fontlingvo. La interfero de la fontoteksto estas ĝenerale nomita imitaĵo.

En la nuna esperanta versio de la romano, mi ankoraŭ ne trovis ekzemplon pri interfero, sed el la libro "Kurso pri la traduka arto de Esperanto" verkita de Li Shijun (1923–2012, esperante Laŭlum), kiu reviziis la manuskripton de *Ruĝdoma Sonĝo,* legiĝas mencio pri miskompreno de "撞客 *zhuàng kè*".

En la 35-a ĉapitro de *Ruĝdoma Sonĝo* vidinte sian fratinon Ora ploranta Xue Pan riverencis al ŝi kaj diris jene:

2 La ritmo de ĉinaj versoj konsistas el ideogramaj tonoj. Rekte tradukite, "kvinideograma versaro, kun la rimo èi".

Ĉine	**Pinjine**	**Interlinia traduko**
原是我昨儿喝了酒，	Yuán shì wǒ zuó er hēle jiǔ,	Fakte mi hieraŭ drinkis vinon,
回来的晚了，	huílái de wǎnle,	revenis malfrue,
路上撞客着了，	lùshàng zhuàng kèzhele,	survoje **renkontis amikon**,
来家未醒，	lái jiā wèixǐng,	hejmen venis sen vekiĝo,
不知胡说了什么，	bùzhī húshuōle shénme,	ne scias kion sensencaĵojn mi diris,
连自己也不知道，	lián zìjǐ yě bù zhīdào,	eĉ mi mem ne scias,
怨不得你生气。	yuànbudé nǐ shēngqì	ne mirinde ke vi koleris.

En sia manuskripto Xie Yuming esperantigis ĝin jene:

> Hieraŭ mi drinkis, malfrue revenis, survoje **trafis amikon**, hejme ankoraŭ ebriis kaj vomis sensencaĵon. Mi mem ne memoras, kion mi diraĉis. Vi juste koleras. (LI Shijun 2023, 65)

Kontrolante lian manuskripton Li Shijun rimarkis la mistradukon de "撞客 zhuàng kè" per "trafis amikon", fakte, ĝi signifas "renkonti fantomon". Finfine, en la eldonita versio Xie Yuming anstataŭis "trafis amikon" per "trafis fantomon".

Simila tradukaĵo aperis en la franca versio. La nura plena franca traduko de *Le rêve dans le pavillon rouge* 'Ruĝdoma Sonĝo' estis produktita en 1981 kaj estis tradukita de tri homoj, Li Zhihua, ĉino vivanta en Francio, lia franca edzino Jacqueline Alézaïs, kaj franca ĉinologo André d'Hormon, kiuj pasigis 27 jarojn laborante kune (TANG Jun 2015). Tamen, eĉ kun tia forta traduka teamo, oni ankoraŭ ne povas forigi la longedaŭran ombron de orientalismo en interpretado (LI Shiwei 2013, 292). Ni konsideru la sekvan simplan ekzemplon el Ĉapitro 6 de la romano.

Ĉine	*我们姑娘年轻媳妇子，也难**卖头卖脚**的...* Wǒmen gūniáng niánqīng xífù zǐ, yě nán mài tóu mài jiǎo de...
Interlinia traduko	Ni knabinoj junaj edzinoj, ankaŭ malfacile vendas kapojn kaj piedojn.
Esperante (Xie Yuming)	*Kaj mia filino, ankoraŭ juna, devas resti hejme.*
France	Quant à ma fille, une jeune femme, il ne lui conviendrait guère d'aller faire étalage de sa frimousse et de ses petits pieds.
Interlinia traduko el la franca	Pri mia filino, apenaŭ taŭgus, ke ŝi pavumu montrante sian vizaĝeton kaj siajn piedetojn.

En la fontoteksto la origina signifo de "卖 'vendi' 头 'kapo' 卖 'vendi' 脚 'piedo' (Mài tóu mài jiǎo)" estas "抛头露面 (pāo tóu lù miàn)", laŭvorte 'montri sian vizaĝon'. La idiomaĵo signifas (-parolante pri virino en feŭda socio) malkovri la kapon kaj montri sian vizaĝon, montri sin publike (ago rigardata kiel nedeca). En la franca traduko, ĝi iĝis "pavumi montrante sian vizaĝeton kaj siajn piedetojn". Tio estas laŭvorta traduko, relative ne tiel preciza.

3 Konkludoj

La celo de ĉi tiu studo estas demonstri la teorion de Mona Baka pri Universalaj Trajtoj de Tradukado. Troviĝas en la esperanta versio de la romano *Ruĝdoma Sonĝo* precipe du trajtoj: simpligo kaj eksplicitigo. La esploraj rezultoj estas jenaj:

1. La simpligaj fenomenoj en la esperanta versio estas aparte evidentaj kaj troviĝas en la tuta teksto. La tradukinto de la esperanta versio uzas multe da rimedoj por simpligi la tradukojn, ekzemple, li anstataŭigis frazojn per substantivaj vortgrupoj, preterlasis tradukon de frazoj aŭ vortoj aŭ tute ne tradukis; uzis frazojn kun nekompletaj frazkomponentoj; vigle aplikis tre koncizajn dialogojn; rime esprimis idiomaĵojn; uzis pseŭdosinonimojn kaj sinonimojn por eviti ripeton, precipe en poezioj, ktp. Sed simpligo iel povas forigi la informojn kaŝitajn en la originala teksto, kaj malfavori al komunikado de la enkorpigitaj informoj. Tial tradukistoj devas konsideri siajn proprajn tradukcelojn kaj elekti taŭgajn tradukmetodojn.
2. Eksplicitajn fenomenojn ni ankaŭ povas vidi en esperanta traduko, kutime kun piednotoj aŭ aldono de kunligantaj vortoj, klarigoj ĉe la idiomaĵoj; aŭ aldono de frazoj, informoj de personoj, lokoj, aŭ eksplicitigo de budhismaj aferoj, anstataŭigo de pronomoj per substantivoj, ktp.
3. Normigo igas la esprimojn de la tuta traduko pli normigita kaj plibonigas la legeblecon de la traduko. Normigaj fenomenoj ankaŭ troviĝas en la esperanta traduko de *Ruĝdoma Sonĝo*, sed ne tiom multe kiel simpligo kaj eksplicitado. Dum la tradukprocezo la tradukinto sekvas certajn normojn kaj regulojn, kiel la konsekvenco de la terminologio, gramatikaj strukturoj, normaj vortprovizoj aŭ tradukspecifoj, personaj nomoj kaj loknomoj; kaj formulaj frazoj legiĝas je komenco kaj fino de ĉiu ĉapitro.
4. Pro interfero en tradukprocezo, la trajtoj de la originalaj tekstoj povas malhelpi la tradukistojn, kaj lasi en la tradukitajn tekstojn ambaŭ trajtojn de cellingvo kaj fontlingvo. Interferojn mi ankoraŭ ne trovis en la esperanta versio, bezonatas plua esplorado.

Analizata verko

Cao Xueqin kaj Gao E. 1996. *Hong Lou Meng*. Beijing: Eldonejo de Popola Literaturo.

Cao Xueqin. 1995, 1996, 1997. *Ruĝdoma sonĝo,* tradukis Xie Yuming, vol. 1–3. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Cao Xueqin. 1978. *A Dream of Red Mansions*, tradukis Yang Hsien-yi kaj Gladys Yang, vol. 1–6. Beijing: Foreign Language Press.

Cao Xueqin. 1973, 1977, 1980, 1982, 1986. *The Story of the Stone*, tradukis David Hawkes kaj John Minford, vol. 1–5. London: Penguin Books.

[Cao Xueqin] Tsao Hsueh-chin. 1981. *Le rêve dans le pavillon rouge*, tradukis Li Zhihua, Jacqueline Alézaïs kaj André d'Hormon. Paris: Gallimard.

Bibliografio

Baker, Mona. 1992. *In Other Words: A Coursebook on Translation*. London/New York: Routledge. https://lantrans.weebly.com/uploads/2/1/1/6/21169610/in_other_words-a_coursebook_on_translation.pdf (02.05.2025)

Baker, Mona. 1993. "Corpus Linguistics and Translation Studies. Implications and Applications." En *Text and Technology: In Honour of John Sinclair*, redaktis Mona Baker, Gill Francis kaj Elena Tognini-Bonelli, 233–250. Amsterdam/Philadelphia: Benjamins. https://corpus.bfsu.edu.cn/Baker_1993_Corpus_Linguistics_Translation_Studies.pdf

Baker, Mona. 1996. "Corpus-based Translation Studies: The Challenges that Lie Ahead." En *Terminology, LSP and Translation Studies in Language Engineering*: *In Honour of Juan C. Sager*, redaktis Harold Somers, 175–186. Amsterdam/Philadelphia: Benjamins.

Becher, Viktor. 2010. "Towards a More Rigorous Treatment of the Explicitation Hypothesis in Translation Studies." *trans-kom* 3, kajero 1: 1–25. https://d-nb.info/1003050980/34

Bernardini, Silvia kaj Federico Zanettin. 2004. "When is Universal not a Universal? Some Limits of Current Corpus-based Methodologies for the Investigation of Translation Universals." En *Translation Universals: Do They Exist?*, redaktis Pekka Kujamäki kaj Anna Mauranen, 51–62. Amsterdam: Benjamins.

HUANG Libo. 2007. 基于汉英/英汉平行语料库的翻译共性研究 'Studo pri tradukkomuneco bazita sur ĉina-angla/angla-ĉina paralela korpuso'. Ŝanhajo: Fudan University Press.

"Kvar famaj klasikaj romanoj." 2022. *Vikipedio*. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kvar_famaj_klasikaj_romanoj (24.02.2025)

Laviosa, Sara. 1998. "Core Patterns of Lexical Use in a Comparable Corpus of English Narrative Prose." *Meta: Translators' Journal* 43, kajero 4: 557–570. https://www.erudit.org/en/journals/meta/1998-v43-n4-meta169/003425ar.pdf

Laviosa, Sara. 2002. *Corpus-based Translation Studies: Theory, Findings, Applications*. Amsterdam: Rodopi.

Laviosa, Sara. 2009. "Universals." En *Encyclopedia of Translation Studies*, redaktis Mona Baker kaj Gabriela Saldanha, 2-a eld., 306–310. London/New York: Routledge. https://ssu.elearning.unipd.it/pluginfile.php/422897/mod_folder/content/0/Routledge_Encyclopedia_of_Translation_Studies_2nd_ed.pdf

LI Bingru. 2022.《水浒传》英译本中的翻译普遍性研究 'Studo pri traduka universaleco en la angla versio de *Water Margin*'. En: 今古文创 Jin gu wen chuang 27: 120–122. https://doi.org/10.20024/j.cnki.CN42-1911/I.2022.27.038

LI Shijun. 2023. *Kurso pri la traduka arto de Esperanto*. Beijing. Fremdlingva eldonejo.

LI Shiwei. 2013.《红楼梦》法译本翻译策略初探 'Studo pri la tradukstrategioj por la franca versio de *Hong Lou Meng*'. 红楼梦学刊 'Revuo de Hong Lou Meng' 3: 285–297. https://www.doc88.com/p-1923142074440.html?r=1

Olohan, Maeve kaj Mona Baker. 2000. "Reporting *that* in Translated English: Evidence for Subconscious Processes of Explicitation? *Across Languages and Cultures* 1, kajero 2: 141–158.

Øverås, Linn. 1998. "In Search of the Third Code: An Investigation of Norms in Literary Translation."*Meta: Translators' Journal* 43, kajero 4: 557–570

Pym, Anthony. 2005. "Explaining Explicitation." *New Trends in Translation Studies. In Honour of Kinga Klaudy*, redaktis Krisztina Károly kaj Ágota Fóris, 29–45. Budapest: Akadémiai Kiadó. https://usuaris.tinet.cat/apym/on-line/translation/explicitation_web.pdf (02.05.2025)

TANG Jun. 2015. "Some Thoughts on the Orientalism in the Translation of *Hong Lou Meng*." *Journal of Inner Mongolia Normal University (Philosophy & Social Science)* 44, kajero 1: 94–99.

Toury, Gideon. 1995. *Descriptive Translation Studies and Beyond*. Amsterdam/Philadelphia: Benjamins.

Vanderauwera, Ria. 1985. *Dutch Novels Translated into English: the Transformation of a Minority Literature*. Amsterdam: Rodopi.

Xiao, Richard. 2010. "How different Is Translated Chinese from Native Chinese? A Corpus-based Study of Translation Universals." *International Journal of Corpus Linguistics* 15, kajero 1: 5–35. https://www.lancaster.ac.uk/fass/projects/corpus/ZJU/xpapers/Xiao_IJCL_TransChinese.pdf

YANG Chongchong. 2013. 从概念整合的角度看翻译的普遍特征与策略 'Esplori la universalajn trajtojn kaj strategiojn de tradukado de la perspektivo de koncepta integriĝo.' 现代语文(语言研究版) *'Modernaj Lingvoj (Lingva Esplora Eldono)'* kajero 3: 149–151.

ZHU Chaowei. 2016. "How Different Is Translated Hongloumeng from Native Classic English Novels: Corpus-based Evidence for Translation Universals." *Asia Pacific Interdisciplinary Translation Studies* 2, kajero 1: 59–73.

Pri la aŭtoro

GONG Xiaofeng estas emerita profesoro pri media inĝenierado en la Universitato de Nanchang (Ĉinio). Ŝi doktoriĝis en 2006. Ŝiaj esploroj traktas interalie protekton de lagoj kaj malsekregionoj, la tradukarton kaj instruadon de Esperanto. Ŝi studis pri Interlingvistiko 2021–2024 ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Ŝia diplomlaboraĵo temis pri la tradukstrategioj en la esperantigita romano *Ruĝdoma Sonĝo*.

Retadreso: arko.gong@gmail.com
ORCID-numero: 0000-0002-6708-4953

About the author

GONG Xiaofeng is a retired professor of environmental engineering at Nanchang University (China). She received her doctorate in 2006. Her research interests include lake and wetland protection, translation, and Esperanto teaching. She studied Interlinguistics during 2021–2024 at Adam Mickiewicz University in Poznań, Poland. Her thesis was about the study of translation strategies in the Esperanto version of the Chinese novel *The Dream of the Red Chamber*.

作者简介

弓晓峰是南昌大学环境工程系退休教授。她于2006年获得博士学位。她的研究方向包括湖泊与湿地保护研究、翻译以及世界语教学。2021年至2024年,她在波兰波兹南密茨凯维奇大学学习跨语言学,其毕业论文是关于中国小说《红楼梦》世界语版翻译策略的研究。

Observation of Universal Features of Translation in the Esperanto version of the Classic Chinese Novel *The Dream of the Red Chamber*

Abstract: *Hong Lou Meng* 'The Dream of the Red Chamber' is one of the four famous classical novels in China; it has been translated into 22 foreign languages, including an Esperanto version translated by Xie Yuming. The novel is good research material for translation. Due to differences in culture and cognitive issues, inconsistencies between the original text and the translated text are inevitable during the integrated translation process. According to the hypothesis by Mona Baker (1992), translated texts also have a particular "translation style", which can be characterised by four Universal Features of Translation, namely: simplification, explicitation, standardisation and interference. Based on this theory, this study presents an analysis of the most frequently cited Translation Universal in the Esperanto version, entitled *Ruĝdoma Sonĝo*, compared with two well-known translations in the English language (Cao Xueqin, tr. Hawkes and Minford 1973; Cao Xueqin, tr. Yang and Yang 1978). The results show that the Translation Universal hypothesis is valid or partially valid in the three translations.

Keywords: Translation Universals; simplification; explicitation; normalization; interference; *Hong Lou Meng*

翻译的普遍性特征在中国古典小说《红楼梦》世界语译本中的应用

摘要:《红楼梦》是中国四大名著之一，迄今已有22种语言的译本，其中包括谢玉明先生翻译的世界语版本。这部小说是翻译艺术研究的良好材料。由于文化和认知问题的差异，在翻译的整合过程中不可避免地会出现原文和译文不一致的情况。根据莫娜·贝克（1992）的假设，翻译文本还具有特定的"翻译风格"，其可以用翻译的四个普遍特征来概括，即：简化、显化、规范化和干扰。基于此理论，本研究对《红楼梦》世界语译本中最常出现的普遍性特征进行了分析，并与两个著名的英语译本（Cao Xueqin, tr. Hawkes and Minford 1973; Cao Xueqin, tr. Yang and Yang 1978）进行了比较。研究结果表明，翻译普遍性假说在三个译本中均成立或部分成立。

关键词: 普遍性特征；简化；显化；规范化；干扰；红楼梦